

LAMI – LASLLIAM Taksa Ilaro

Language Policy Programme
Strasbourg



ALTE – LAMI kontribuantoj

Membroj de LAMI

Lorenzo Rocca (LAMI-prezidanto)
Cecilie Hamnes Carlsen (kunprezidanto)

Anna Mouti
Carmen Peresich
Giorgio Silber kaj Lorena Bellotti
Ina Ferbežar kaj Mateja Eniko
Joe Sheils
José Pascoal
Katerina Vodickova
Mohammad Al Qara kaj Roswitha Hunold
Sabrina Machetti kaj Paola Masillo
Stefanie Dengler

ALTE-Institucioj

Società Dante Alighieri
Western Norway University of Applied Sciences

Aristotle University of Thessaloniki
OSD - Österreichisches Sprachdiplom Deutsch
KCE - Kultura Centro Esperantista
University of Ljubljana
ALTE Individual Expert Member
University of Macao
Charles University
Worldwide Bildungswerk
University for Foreigners of Siena
Goethe Institut

La kontribuantoj de LAMI deziras danki la Sekretariaton de ALTE, nome Nick Saville, Mariangela Marulli kaj Graham Seed pro la konstanta kunlaborado kaj John Savage (Cambridge University Press & Assessment) pro la provlegado de la angla versio.

LLAT translations

The LAMI members wish to thank the institutions and colleagues engaged in the translations of the tools, for their contribution to this new ALTE multilingual resource.

Czech version

Kateřina Vodičková

Charles University

Dutch version

Goedele Vandommele

Helena Van Nuffel

CNaVT – KU Leuven

Centrum voor Taal & Onderwijs KU Leuven

Esperanto version

Lorena Bellotti

KCE - Kultura Centro Esperantista

German version

Carmen Peresich

Stefanie Dengler

OSD - Österreichisches Sprachdiplom Deutsch

Goethe Institute

Greek version

Anna Mouti

Christina Maligkoudi

Aristotle University of Thessaloniki

Democritus University of Thrace

Italian version

Antonella Priori and Carlo Pirozzi

Greta Mazzocato, Sofia Bulla and Francesco

Bortolussi

Società Dante Alighieri

CPIA di Treviso

Norwegian version

Cecilie Hamnes Carlsen and Live Grinden

Western Norway University of Applied Sciences

Portuguese version

José Pascoal

University of Macao

Romanian version

Dina Vilcu

Babes-Bolyai University

Slovenian version

Ina Ferbežar and Mateja Eniko

University of Ljubljana

Spanish version

Javier Fruns Gimenez and Nuria Vaquero

Ibarra

Instituto Cervantes

Enkonduko al la Taksa Ilaro de LAMI-LASLLIAM

ĜENERALA CELO: proponi praktikajn rimedojn por la disvolvo de taksa ilaro bazita sur LASLLIAM en kadro celanta plibonigi la ligojn inter lernado kaj taksado.

Ene de la agadplano de LAMI 2021-2023¹, 19 LAMI-anoj, el 13 ALTE-institucioj², reprezentantaj 12 lingvojn³, ellaboris kvar klarigilojn por ilustrati la uzadon por taksaj celoj de la referenca gvidilo *Legopovo kaj Lernado de Dua Lingvo por la Lingva Integrado de Adoltoj Migrantoj* (LASLLIAM⁴).

Tiaj iloj estas parto de pli larĝa kadro rilata al la pilota fazo de LASLLIAM (vidu LASLLIAM 7.3).

Celataj uzantoj kaj lernantoj

La iloj estas elpensitaj por uzantoj envolvitaj en la migrada kunteksto: instruistoj kaj volontuloj agantaj en kursoj por alfabetigo kaj dua lingvo. La celatoj estas do ne- aŭ malmult-kleraj adultaj migrantoj, kiuj estas engaĝitaj en samtempaj procezoj por akiro de alfabetismo kaj dua lingvo ene de edukaj kaj profesiaj instrumedioj (vidu LASLLIAM 1.3 kaj 1.4).

La proponita LAMI - LASLLIAM- Aparato por Taksado (LLAT)

La LAMI-LASLLIAM-Aparato por Taksado (LLAT) celas subteni objektecon kaj kvaliton per inkluziva kaj personeca lernado kaj instruado.

Ĝi reflektas la ago-orientitan aliron (KEFR, 2001; KEFR Akompana volumo, 2020) kiu rigardas lingvolernan-tojn prioritare kiel sociajn agantojn okupiĝantajn pri taskoj. Precipe, LLAT konsideras taskojn bazitajn sur komunika lingvo-agadoj implikantaj parolan kaj skriban ricevon, produktadon kaj interagadon, kiel ilustre per la LASLLIAM-skaloj (vidu LASLLIAM 4.2).

Pli specife, la kvar iloj proponas adekvatajn kaj taŭgajn taskojn, kie "adekvata" rilatas al la kalibrado de tasko rilate al ĝia deklarita LASLLIAM-nivelo, dum "taŭga" rilatas al la kapablo de la tasko trakti ne nur la bezonojn de la lernantoj rilate al la cellingvo en si mem, sed ankaŭ al la temoj kaj komunikaj situacioj reflektantaj ilian realvivan uzon de la cellingvo (LAMI, 2016: 34).

Sekve, konforme al la celo de KEFR kreskigi paraleligon inter pedagogiaj kaj realvivaj taskoj (KEFR, 2001: 27), LLAT proponas la sekvan:

- la unuaj du iloj uzeblaj ene de la "bonveniga fazo", konsidere pri kaj la analizo de bezonoj kaj la lokigo de la lernantoj rilate al ilia alfabeteco kaj dualingva profilo (vidu LASLLIAM 6.2.1).
- la lastaj du iloj por taksado de la atingoj de la lernanto ĉe la fino de kurso (vidu LASLLIAM 6.2.3).

Aldone al LASLLIAM kaj aliaj supre menciitaj rimedoj de Konsilio de Eŭropo, LLAT rilatas al nombro da iloj prenitaj el LIAM, Toolkit⁵, parte adaptitaj al la kunteksto kaj bezonoj de la celataj lernantoj⁶.

¹ <https://www.alte.org/resources/Documents/LAMI%20ACTION%20PLAN%202021-2023.pdf>

² Aristotle University of Thessaloniki, Babes-Bolyai University, Charles University, CNaVT – KU Leuven, Goethe Institute, Instituto Cervantes, KCE - Kultura Centro Esperantista, OSD - Österreichisches Sprachdiplom Deutsch, Società Dante Alighieri, University for Foreigners of Siena, University of Ljubljana, Western Norway University of Applied Sciences, Worldwide Bildungswerk

² Czech, Dutch, English, Esperanto, German, Greek, Italian, Norwegian, Portuguese, Romanian, Slovenian, Spanish

³ Bohema, nederlanda, angla, esperanto, germana, greka, itala, norvega, portugala, rumana, slovena kaj hispana

⁴ <https://rm.coe.int/prems-008922-eng-2518-literacy-and-second-language-learning-couv-texte/1680a70e18>

⁵ <https://www.coe.int/en/web/language-support-for-adult-refugees/home?desktop=true>

⁶ Tool 25 for needs' analysis; Tool 26 for the placement; Tool 27 for the linguistic profile; Tool 31 for the communicative situations related to scenarios; Tool 32 for the communicative functions assessed by the four tools.

Adoptita aliro

Evoluigante la ilojn, LAMI adoptis la aliron enfokusigitan en LASLLIAM 6.1. Tio signifas ke la uzo de LLAT:

- estas celita kiel plene enigita en la lernomedion; ĉi-rilate, la kvar iloj reprezentas konkretajn ekzemplojn de la rekomenditaj uzoj de LASLLIAM en la kampo de taksado, kaj konsideras la gravan kondiĉon, ke la referenca gvidilo ne estas desegnita por la disvolvo de ŝablonaj altnivelaj intereso kaj grandskalaj testoj. Tiurilate, LLAT konsistigas specimenon de honesta kaj taŭga uzo de LASLLIAM, en evidenta kontrasto kaj klara opozicio al la altrudo de lingvaj postuloj ĉe ne-kaj subkleraj migrantoj por rezida kaj civitaneca celoj (ALTE kaj Konsilio de Eŭropo Enketo, 2020⁷).
- estas desegnita por subteni la koncepton de profilo kaj la "rekono de partaj kompetentoj" (KEFR, 2001: 175). En ĉi tiu signifo, LLAT permesas al uzantoj illustri neegalajn profilojn de lernantoj, provizante pruvon de tio, kio estas atingita.
- kondukus ĉiam al pozitivaj rezultoj por subteni la motivadon de lernantoj, atentante la fakton ke LASLLIAM-skaloj ne celas fiksi ajnan detranĉan punkton.
- devus kontribui al la plibonigo de la Portfolio de la lernanto⁸, aparte konsiderante la Lingvan Biografion, agnoskante kaj evaluante la plurlingvan repertuaron de la persono.
- estus enigenda en LOA (Lerno-Orientita Taksado), celante konstantan envolvon de la lernanto en ĉiu formo de taksado. Tio signifas provizi taŭgajn rimarkojn kaj pli ĝenerale, konsciigi pri la taksaj proceduroj kiel parto de la ĝenerala lernada procezo.

Kelkaj ĝeneralaj gvidlinioj

La jenaj estas kelkaj punktoj konsiderendaj en la uzo de LLAT. La uzantoj estas invititaj:

- adapti la enhavon de la iloj al la cello, la kunteksto (lando, regiono, ktp.) kaj la specifaj bezonoj de la lernantoj, konsidere pri kulturaj implicoj en la administrado de instrumaterialoj, same kiel interkulturaj aspektoj de interago kun kaj inter lernantoj
- atenti pri la sentoj de la lernantoj kaj zorge elekti temojn kaj bildojn
- konscii pri eblaj specialaj bezonoj de la lernantoj, precipe kontroli eventualajn vidajn kaj/aŭ aŭdajn mankojn
- trankviligi la lernantojn antaŭ ol apliki ĉiun ilon, atentigante ekz.: "Tio estas utila por helpi min ekkoni viajn lingvajn bezonojn kaj do ebligi al mi pli bone fari mian laboron". Memorigi al la lernantoj, ke ĉi tiu aktiveco ne antaŭvidas la eblecon "malsukcesi"
- konsideri la rekomendojn rilate al la grafika aranĝo, se postulata en la iloj.

LLAT-strukturo

Ĉiuj kvar iloj sekvas similan ŝablonon:

- komencante per difino de la celoj kaj precizigante la koncernajn LASLLIAM-skalojn;
- poste ilustrante la formaton de la taskoj, dum oni provizas pliajn gvidliniojn integrotajn en la pli ĝenerala gvidado skizita supre;
- kaj konkludante per prezento de la klarigaj taskoj rilate al la koncernaj LASLLIAM-priskribiloj sekvataj de la propono de sugestita rezulto.

⁷ <https://rm.coe.int/linguistic-integration-of-adult-migrants-requirements-and-learning-opp/16809b93cb>

⁸ <https://www.coe.int/en/web/portfolio>